

LA KORO SUTRO THE HEART SUTRA

by Bruce N. Kennedy.

Om. Gloron al la Beata Saĝo Pluirinta.

La Avalokiteŝvara nobla, Bodhisatvo, moviĝinte en praktiko de la Saĝo Pluirinta, vidis ke malplenas laŭnature la kvin agregatoj.

Jen, ho Ŝariputro,
form' malplenas, kaj malpleno formas mem;
malplen' je formo ne disiĝas, formo ne disiĝas je malpleno.
Kio formas ajn, malplenas tio;
kio ajn malplenas, formas tio. Same sento kaj percepto, la impulsoj kaj konscio.

Jen, ho Ŝariputro,
ĉiuj Darmoj havas signon de malpleno;
ili ne kaŭziĝas, ne haltiĝas;
ne malpuras, ne puriĝas;
ne mankemas, ne kompletas.

Tial, Ŝariputro,
en malpleno estas ne la formo, ne la sento, ne percepto, ne impulsoj, ne konscio;
ne okul', orelo, nazo, lango, korpo, menso;
ne la formo, son', odoro, gusto, tuŝo, penso;
ne vidaĵo, tiel plu ĝis ne mensaĵo;
ne malklero, ne malkle'forigo kaj plu tiel ĝis ne maljuniĝ'morto;
ne la maljuniĝforigo, mortforigo; ne la suferado, devenado, haltigado, vojo;
ne kompreno, ne atingo, neatingo.

Tial, Ŝariputro,
Bodhisatvo vivas.
Pro neatingo kaj fidinte al la Saĝo Pluirinta, Bodhisatvo senbara koro vivas.
Li, senbaran koron posedante, sentimulo kaj falsecvenkinto.
Fine Nirvan' subteniĝinto.

Ĉiuj Budhoj triepokdevenaj, la fidintaj al la Saĝo Pluirinta, plenvekiĝas al la Plej Perfekta Ilumino.

Sciu, do:
la Saĝo Pluirinta estas eminenta mantro, grandascia mantro, la plej alta mantro,
senkompara mantro, mildigil' de ĉia suferado, senfalseca vero!
Per la Saĝo Pluirinta jen la mantro eldiriĝas:

Gate, gate, paragate, parasamgate, bodhi, svaha!